

La 26^{an} de majo 1966 mortis Henri Micard.
La kulturdomo de Esperanto, kiun li fondis en 1951, tuj ricevis pli ol tri cent leterojn el diverslandaj organizaĵoj. Ĉiuj tiam ege bedaŭris la perdon de unu el la plej agemaj esperantistoj.
La kulturdomo decidis omaĝi al Henri Micard plurmaniere, interalie per eldono de libreto *Naskiĝo de Esperanto-domo, kastelo Grésillon* (kiu fakte aperis nur en 1968), kaj per tuja publikigo de biografio en revuo *Kulturaj Kajeroj*. Tiu biografio diligente verkita de Jean-Paul Guillot kaj Pierre Babin, estis jam preta fine de 1966.

Jarojn poste, preskaŭ ĉiuj forgesis tiun belegan tekston, plenan je faktoj kaj detaloj, kiuj tre helpas kompreni la grandecon de Henri Micard.

Kaj, ĉu kredeble? nuntempe esperantistoj jam scias neniom pri la fondinto de Grésillon!


Do jen denove en 2009 la vivo de Henri Micard, kiu nelacigeble por atingi de plej altaj celoj bataladis, per

lukto kontraŭ la malfavora sorto (p. 2);
lukto favora al la kulturo (p. 7);
lukto favora al la homoj (p. 15);
lukto favora al la internacia interkompreniĝo (p. 19).



VIVO DE HENRI MICARD

(1897 – 1966)



Vivo de Henri Micard
(1897 – 1966)



In mia kastelo la esperantistoj
el la diversaj landoj sentas
ke ili estas ~~stas~~ en sia
propra lando. Por mi estas la plej
bona rekompenco.

H. M.

Lukto kontraŭ la malfavora sorto

FINE de la XIX^a jarcento vivis en Parizo juna paro. La edzo estis laboratori-helpanto ĉe instituto Pasteur. Ĉar lia salajro ne estis tre alta, ankaŭ la edzino laboris : ŝi estis mastrumistino.

La 6^{an} de aŭgusto 1897 naskiĝis Henri. Ĉar liaj gepatroj laborante ne povis taŭge zorgi pri li, eble ankaŭ ĉar ili preferis por li la kamparon, ili decidis sendi la bebon al la edzinaj gepatroj vivantaj en urbeto de departemento Sarthe, apud urbo La Flèche. Tie ĝis sia tria jaro vivis Henri, dorlotata de siaj geavoj, vivanta kiel la vilaĝaj geknaboj.

Kvar jarojn antaŭ lia naskiĝo la parizanoj, kiuj ĉiam bezonis pli da akvo, decidis kapti la fontojn de rivereto Avre, ĉe limo inter departementoj Eure kaj Eure-et-Loir. Per akvodukto longa je cent tridek kvar kilometroj, oni ĉiutage alfluigis al Parizo la puregan akvon de la fontoj. Sed estis necese ĉiutage kontroli la purecon de tiu akvo. Tial oni instalas en malnova muelejo laboratorion ĉe vilaĝo Rueil apud la fontoj.

Tien oni sendis la patron de Henri, kiu de tiu tempo povis vivi kun siaj gepatroj.

La knabo pasigis agrablegajn tagojn en tiu kamparo, al kiu li enamiĝis por ĉiam. Li sekvis la patron al la laboratorio. Li trakuris kun li la kamparon por ĉasi. Li promenis kun li laŭlonge de la rivereto kaj iniciĝis je fiŝkaptado. Li naĝis, biciklis. Li vivis, kun gepatroj nun iom

pli riĉaj, la vivon de petolema, feliĉa solinfano, ĉar pli juna fratino mortis je sia dua jaro.

Eĉ knabo, kiu ŝatas la kamparon pli ol ĉion, devas vizitadi lernejojn. Tion li faris en la geknaba lernejo de la vilaĝo. La instruiston S^{ron} Moulard li multe ŝatis, kaj eĉ multajn jarojn poste li parolis pri li kun granda emocio. Kiel bona lernanto, li ricevis la ateston pri lernado en 1908, kaj la sekvan jaron preparis ekzamenon por ricevi stipendion. Li deziris fariĝi inĝeniero, kaj tiucele li devis viziti Parizan lernejojn. Bela estonteco malfermiĝis por la knabo.



Henri Micard kun siaj gepatroj.

En januaro 1909, kiel ofte okazis, Henri akompanis sian patron kaj kelkajn liajn amikojn por ĉasado. La knabo multe ŝatis tiun sporton, kiu ebligis al li trairi la kampojn kaj la arbarojn. Li estis preskaŭ dek-du-jara, kaj li ŝatis kunesti kun la plenkreskuloj kaj partopreni iliajn aktivajojn.

Post longa, bona promenado eble laciga, ĉiuj ĝoje revenis hejmen al la vilaĝo. Antaŭ ol eniri la domon, pro singardeco, unu el la ĉasantoj deziris malŝargi sian pafilon.

Kio okazis? Henri ricevis pafon en sian dekstran genuon, kiun ĝi frakasis!

Oni transportis lin sur la liton. Dum kvin horoj oni atendis la kuraciston, kiu devis laŭiri kvin-kilometran neĝkovritan vojon per ĉevaltirata kabrioleteto. Henri perdis multon el sia sango. La kuracisto faris ĉion eblan: purigado de la vundo, pansado...

Li revenis ĉiutage, sed la genuo infektiĝis, kaj oni transportis la knabon al la hospitalo de urbo Verneuil. Tie la kirurgo decidis fortranĉi la kruron sed nur la postan tagon, ĉar la knabo estis lacega pro grandaj suferoj dum la vojaĝo sur kruda vojo.

La febro subite malplialtiĝis, kaj la kirurgo prokrastis la operacion. Post kelkaj semajnoj li decidis, ke Henri iru al hospitalo Charité en Parizo. La knabo estis plurfoje operaciita, sed, ĉar la genu-ostaro estis frakasita, li finfine revenis hejmen, irante helpe de du lambastonoj, sin apogante nur sur la maldekstra kruro, ĉar la dekstra restis faldita malantaŭen.

Tiam la fame konata profesoro Gosset provis malfaldigi la kruron kaj ĝin rektigi per deartikigo de la genuo. Sed estis necese ne ĝeni la normalan kreskadon de la gambo. La operacio estis ege riska en tiu epoko. La profesoro multe studis kaj klarigis kion li intencis fari, al siaj internuloj en la ĉeesto de la knabo, kiu atente kaj emociplene aŭskultis.

La operacio sukcesis. Por ke la knabo havu la eblecon iom distriĝi kaj iri de loko al loko, lia patro faris veturileton per biciklo-radoj. Ĉar li estis tre lacigita de la diversaj operacioj, oni devis lin veturigi al urboj La Bourboule ĉe montaro kaj Saint-Aubin ĉe marbordo.

En la maldekstra kruro, kiu devis multe labori, ĉar nur ĝi funkciis, ostito sin deklaris. Novaj operacioj: malfermo de la sinsekvaj abscesoj, kuracado, engipsigado de la gambo. La tiam dek-ses-jara junulo devis resti tute senmova. La gepatroj lin instalas ekstere sur ripoz-seĝo, sub larĝa blua ombrelo. La profesoro diris al li, ke li ne rajtas paŝi antaŭ kompleta kreskado de lia korpo.

Kiom longaj estis la tagoj! Henri iom muzikis per mandolino, sed kun teruro konstatis, ke preskaŭ ĉiuj liaj scioj enkapigitaj dum la lerneja tempo nun forviŝiĝis. Li decidis ĉion relerni.

Baldaŭ komenciĝis la unua mondmilito. Kvar samaĝaj kamaradoj de Henri memvole varbiĝis, kaj la junulo suferis, ke li ne povas ilin akompani (la kvar junuloj mortis ĉe la fronto).

La juna kriplulo, helpata de la vilaĝa instruistino relernis ĉion, ĉar li eĉ ne memoris la mekanismon de la divido. Problemoj sekvis diktadojn; lecionoj pri historio sekvis lecionojn pri geografio kaj scienco. En 1916 en la lernejo, kie gejunuloj trapasis la ekzamenon por elementa diplomo, oni povis vidi viron, kiu puŝas lamveturilon, sur kiu kuŝis junulo, baldaŭ dek-naŭ-jara, de ekzamenanto al ekzamenanto.

Henri sukcesis, kaj decidis provi la superan diplomon. La laboro ne timigis lin, sed li devis lerni... modernan lingvon tute sola. Li elektis la anglan lingvon. En tiu epoko ne ekzistis la radio kaj la televido kun siaj kulturaj programoj. Li aĉetis librojn kun skribita prononcado, kaj, ĉar la vilaĝa instruistino ne plu povis helpi lin, li lernis per koresponda kurso.

Dufoje li malsukcesis, ĉar li uzis la librojn de sia kuzino Marie-Thérèse (por eviti elspezojn) kaj la programo de la supera diplomo

ne estis la sama kaj por la knaboj kaj por la knabinoj! Li fine kompletigis siajn sciojn, kaj sukcesis en oktobro 1918 : unuafoje li aŭdis la anglan lingvon okaze de tiu ekzameno!

Oni tuj proponis al li instruistan postenon. Li multe hezitis, ĉar lia tiama intenco estis fariĝi redaktisto en iu sekcio de la Pariza administracio. Tiam li sukcesis iri nur helpe de du lambastonoj.

Dum la pasinta jaro li estis korespondinta tre regule kun sia kuzino Marie-Thérèse, lernantino en instruistina seminario. Li jam spertis, kiom sindonema ŝi estas. Se li konsentus la proponon de la edukada inspektoro, li havus la saman profesion kiel ŝi... Li konsentis kaj kuraĝe iris al urbo Evreux, kie en la klasĉambro li paŝis helpe de nur unu lambastono... kaj de la klastabloj!

Jam la junulo atingis unuan venkon. Post longaj jaroj terure suferigaj, la knabo, kiu de sia dek-dua jaro ne estis kiel la aliaj, kiu subite vidis siajn esperojn forsvenintaj, kiu ne havis veran junulan vivon, kiu kuraĝe decidis ĉion relerni por kompensi la tempo-perdon, sukcesis nur per volo-forto reveni al normala socia vivo, kaj preskaŭ simbole eĉ forlasis unu el siaj bastonoj.

Estante knabo dek-ses-jara, li spitis la malfavoran sorton; estante junulo, li pravigis tiun spitadon.

Lukto favora al la kulturo

HENRI Micard, komencanta instruisto, ne sentis sin tre kontenta en la urba lernejo. Li petis postenon en vilaĝo, kaj estis sendita en departemento Eure al urbeto Broglie, kies nomo estas mondkonata, ĉar tie staras la kastelo de la familio De Broglie, al kiu apartenas famaj fizikistoj Maurice kaj Louis-Victor; ankaŭ en tiu urbeto naskiĝis alia granda fizikisto Augustin Fresnel.

En Broglie Henri Micard vivis en familia medio ĉe lernejestro S^{ro} Raboisel, despli feliĉe, ke la tuta salajro de la juna instruisto ne sufiĉis por gastoj en hotelo! Lia fizika stato pliboniĝis, li daŭre korespondis kun Marie-Thérèse, kaj la 5^{an} de aŭgusto 1919 en urbo Noyen-sur-Sarthe (departemento Sarthe) la gejunuloj geedziĝis.

Nova venko por la junulo : en tiu okazo li tute forlasis sian duan lambastonon kaj iris al la urbodomo sin apogante sur promenbastono kaj sur la ŝultro de sia edzino. Estis nova simbolo, ĉar la junulino, kiu morale tiom helpis la kriplulon, de tiam fariĝis sindonema edzino kaj plu helpis, ĉiutage subtenis la edzon en ĉiuj aspektoj de lia aktiva vivo, ĝis lia morto.

En septembro la juna paro ricevis duoblan postenon en Cormeilles, alia urbeto de la departemento Eure, riĉa je monumentoj de la XI^a, XV^a kaj XVI^a jarcentoj. Henri Micard nelacigeble opiniis, ke lia venko kontraŭ la sorto ne sufiĉas, kaj decidis daŭrigi sian studadon por instrui en liceo. Dum du jaroj li tiucele studis, kaj frumatene



La 5^{an} de aŭgusto 1919 Henri kaj Marie-Thérèse geedziĝis.

antaŭ la malfermo de la lernejo kaj malfrue vespere post la profesia laboro.

En aŭgusto 1920 naskiĝis knabo, kiu mortis post du monatoj. La paro daŭrigis sian studadon ĝis printempo 1921, kiam Henri Micard lacigita de troa laboro malsaniĝis : pulma lezo. Ambaŭ laboroj ĉesis, kaj la profesia kaj la persona. Post resaniĝo la geinstruistoj estis senditaj al malgranda vilaĝo, kie la laboro ne estis tiom streĉa.

Tie naskiĝis filino, Josette. En tiu vilaĝeto La Haye-Aubrée, kie la tute nove konstruita lernejo staris ekster la domaro, Henri Micard fariĝis vilaĝa administra sekretario. Estis laboro nova, al kiu li devis

alkutimiĝi, sed plaĉa al li, ĉar li ne plu povis labori cele al instruado en liceo, kaj ankaŭ ĉar li sentis sin pli proksima al la vilaĝanoj, pli bone ekkonis iliajn vivon kaj zorgojn. Li tiel retrovis ankaŭ iom el siaj infanjaroj.

En 1925, gesinjoroj Micard decidis forlasi la departementon Eure kaj alproksimiĝi al siaj gepatroj vivantaj en urbo La Flèche (Sarthe). Ili petis, pere de profesia bulteno, interŝanĝon de postenoj, kaj tiel venis al Epineux-le-Seguin, al tiu malgranda vilaĝo, kiu baldaŭ fariĝis konata en la tuta mondo.

Tien, kie naskiĝis filo (Jean) ili alvenis en aprilo 1926. La lernejo estis kaduka, tre malĝojiga post la bela konstruaĵo de La Haye-Aubrée. En la antaŭa posteno la du klasoj estis geaj. En Epineux-le-Seguin (316 loĝantoj), knabinoj kaj knaboj estis en malsamaj klasoj. Ĉiu el la geinstruistoj devis instrui tridek kvin infanojn el ĉiuj niveloj.

Ankaŭ tie Henri Micard estis vilaĝa sekretario, kaj li tuj laboregis zorgante pri la infanoj kaj en kaj ekster la lernejo, eĉ post iliaj lernejoj jaroj. Plurfoje, ĉiun semajnon dimanĉe la geinstruistoj kunvenigis la ekslernantojn por daŭrigi la instruadon, distri ilin, prepari festojn kaj vojaĝojn. La celo de tiuj vojaĝoj ne estis tre malproksima, ĉar mankis sufiĉaj financaj rimedoj; sed tiuj junaj vilaĝanoj tiuokaze vizitis la marbordon nordan aŭ okcidentan unuafoje en sia vivo. Eĉ multaj el ili tiel unuafoje veturis per trajno.

Post kelkaj jaroj la vojaĝantoj pasigis eĉ plurajn tagojn ĉe la marbordo! Tion la paro Micard povis fari dank' al la financa profito de la festoj. Sed imagu, kiom da laboro postulis la preparado de tiuj festoj : elekto de taŭga programo, pretigado de ofte mallertaj vilaĝanoj al prezentado de kantoj, dancoj, teatraĵoj. Oni devis fari la kostumojn, la dekorojn. Ne ofte gesinjoroj Micard enlitiĝis je taŭga horo.

Sed per tiu laboro ili atingis duoblan por ili tre gravan celon. Per la mono enspezita, ili ne nur distris kaj pluinstruis la geknabojn, sed

ili ankaŭ iomete modernigis sian malnovan lernejon per aĉetado de materialo : en dek jaroj tute ŝanĝiĝis la meblaro. Kaj, eĉ pli grave, la geinstruistoj tiel pliproksimiĝis al la vilaĝanoj, akiris ilian estimon, ilian simpation, ilian fidon.

Henri Micard ne kontentiĝis per tiu profesia agado. Li ankaŭ helpis la plenkreskajn vilaĝanojn per sia laboro en la administrado de la vilaĝaj aferoj, kiel sekretario kaj ankaŭ persone. Ne pasis unu tago, kiam li ne ricevis la viziton de kelkaj samvilaĝanoj je ia ajn horo por informoj pri iu aŭ alia problemo, kiu necesigis lian kompetentecon. Li tre ofte, post la laborhoroj, iris al iu malproksima farmobieno por praktiki injekton al malsanulo aŭ eĉ por vindi mortinton.

Sed Henri Micard scipovis ankaŭ malkontentigi la vilaĝanojn, kiam li konsciis tion necesa. En tia kazo li batalis, ne cedis ĝis la tempo, kiam la hieraŭaj kontraŭuloj fariĝis denove amikoj.

Jen trafa ekzemplo. En 1936 gesinjoroj Micard devis apartigi la knabojn de la knabinoj en du diversajn klasojn (en ĉiu klaso ĉeestis infanoj aĝaj je ses ĝis dek du jaroj). Tiam ili opiniis, ke estus pli taŭge apartigi la infanojn ne laŭ ilia sekso sed laŭ aĝo en du geajn klasojn. S^{ro} Micard instruus la pli aĝajn geknabojn kaj S^{ino} Micard la malpli aĝajn. Sed ilin kontraŭstaris la tradicio reprezentita de la paroĥestro kaj de la episkopo : knaboj kaj knabinoj ne sidu sur la samaj benkoj !

La geinstruistoj estis subtenataj de sia administracio. La geigo efektiviĝis. La episkopo decidis, ke ne plu okazos diservoj en la preĝejo, eĉ por la geedziĝoj, baptitoj kaj enterigoj. La kultantoj devis iri al vilaĝo malproksima je kvin kilometroj kaj riproĉis la geinstruistojn, kiuj ne cedis, ĉar ili sciis, ke pli bona estos la instruado.

Dum ses monatoj daŭris la kverelo, kiu foje fariĝis preskaŭ revolucio : la prefekto eĉ proponis sendi al Epineux-le-Seguin ĝendarmojn por protekti gesinjorojn Micard. Poste ordo revenis, kaj la vilaĝanoj povis denove kulti en la preĝejo. Finiĝis la batalo, dum kiu Henri

Micard, certa pri sia praveco, neniam cedis. La kontraŭstaroj ne timigis lin pli ol la malsano.

Ek de tiu jaro 1936, Henri Micard uzadis la metodon Freinet por instruado. La presado de iliaj propraj « liberaj tekstoj » multe plaĉis al la infanoj. Ili aperigis gazeton, kiu estis sendita al ĉiuj familioj kaj, en 1939-1940, al ĉiuj soldatoj el la vilaĝo. Jam de 1925 Henri Micard prezentis filmojn edukajn en sia lernejo. Li estis la unua en la departemento, kiu tiel instruis siajn gelernantojn pri historio, geografio kaj scienco. Kompreneble, li funkciigis la kinematografon per mano, kaj li laŭtlegis klarigojn.



La domo de gesinjoroj Micard.

La jaro 1941 vidis la ĉesigon de tiu laboro dediĉita kaj al la ge-
knaboj kaj al iliaj gepatroj en la vilaĝo Epineux-le-Seguin. Pro sia
sinteno Henri Micard estis sendita al alia vilaĝo. Sed danĝero ŝvebis
super lia kapo : la tiam registaro intencis lin senoficigi. La inspek-
toro, sciante, kiom valora estas la instruisto kaj admirinda la homo,
informis lin, kaj Henri Micard preferis emeritiĝi. Li prezentis me-
dicinajn atestilojn (ĉar li fakte estis malsana) kaj la administracio
konsentis pri lia emeritiĝo.

Li iris al urbo Nantes, kie S^{ino} Micard ricevis postenon. La mate-
riala aspekto de la familio ne prezentiĝis favora : tri infanoj (en 1935
naskiĝis dua filino, Janette), neniuj loĝejoj, unu salajro kaj ege malalta
pensio ne estis entuziasmigaj faktoroj en vivo dum milita tempo.
Henri Micard trovis asekuran oficon sed malgravan, ĉar li ne povis
disponi grandan sumon por la aĉeto. Per sia kriplula veturileto li tra-
iris la urbon por enkasigi la kvitancojn, sed li ne estis sufiĉe altrud-
ema por varbi novajn klientojn. Ne tre longe daŭris tiu vivo.

Kiam Nantes estis unuafoje bombita, ĉiuj infanoj, gemaljunuloj kaj
kripluloj estis evakuitaj el la urbo al alia departemento. La akcept-
anta departemento estis Mayenne, kaj tiel Henri Micard denove trov-
iĝis en Epineux-le-Seguin. Tie li vivis ĝis la liberigo de la lando.

En 1945 li petis sian reoficigon. La inspektoro proponis al li pos-
tenon en la ĉefurbo de la departemento : Laval. Henri Micard rifuzis
dirante :

« Oni min forpelis el Epineux. Mi petas mian reoficigon en Epi-
neux. »

La inspektoro montris al li ĉiujn avantaĝojn de posteno en urbo
Laval. Sed Henri Micard ne akceptis kaj fine revenis instrui kun S^{ino}
Micard en Epineux-le-Seguin.

Kaj li tuj reaktiviĝis. Ne nur kiel instruisto, sed ankaŭ kiel edukisto
de la gejunuloj post la lernej-jaroj kaj ankaŭ de la aliaj vilaĝanoj. Sed

kion fari en ankoraŭ malfacila postmilita periodo, sen mono, en
vilaĝeto ? Io povas ofte anstataŭi monon : starigo de preciza celo kaj
volo batali ĝis la atingo de la celo.

En 1947, Henri Micard decidis krei vilaĝan kulturdomon (*foyer
rural*), kie estos prezentataj al la vilaĝanoj teatraĵojn, filmojn, pre-
legojn. Li mem klarigis la kialon de tiu fondado, okaze de elektado.
Li skribis :

« Post la liberigo de nia lando, la tiamaj registoj instigis nin al kre-
ado de postlernejaj organizoj. Mi povis krei "laikan amikaron", sed
mi timis, ke mi ofendos kelkajn personojn en mia vilaĝo, kiu feliĉe
ne konas lernejan konkuradon ; ĉar mi deziris akordigi, unuigi ĉiujn,
mi elektis "vilaĝan kulturdomon", kiu dank' al sia plena neŭtraleco
ebligas la kunigon de ĉiuj bonvoloj. Mi faris tion, por eduki kaj distri
ĉiujn vilaĝanojn, kiaj ajn estas iliaj opinioj aŭ kredoj. »

Tiu ambicia projekto estis realigenda sen financaj rimedoj, sen
kunvenejoj. Ekzistis la antaŭa knabina lernejo, malnova, kaduka kons-
truajo. La vilaĝestraro konsentis pri la disponigo, sed ĝi rifuzis al la
instruisto sian helpon. Henri Micard sukcesis entuziasmigi grupon
da gejunuloj (kaj aliaj vilaĝanoj), kiuj konsentis labori fine de siaj
labortagoj.

Vandoj estis faligitaj, la malnovaj pavimoj estis anstataŭigitaj per
ligno-plankoj. Oni skrapis, masonis, gipsis, farbis. Oni konstruis scen-
ejon, kulisojn. La malnovaj lernejoj tabloj transformiĝis en benkojn...
iom malmolajn ! Kaj baldaŭ ekzistis en departemento Mayenne, en
unu el ties plej malgrandaj vilaĝoj, la unua vilaĝa kulturdomo.

Ne sufiĉis la loko. Oni bezonis materialon, ĉefe kinematografon.
Kooperativa asocio estis kreita kun akcioj. Ĉar estis necese tuj ko-
menci la aktivaĵojn, gesinjoroj Micard pruntedonis la sumon necesan
por la aĉetado de la aparato. Por reenspezi tiun sumon, la geinstru-
istoj prezentis filmojn en tri diversaj vilaĝoj. Tio signifis rapidan

vespermanĝon, ŝarĝadon de la peza aparato en aŭtomobilon, veturadon sur la senlumaj, kelkfoje krudaj vojetoj, kaj revenon malfruan, plurfoje ĉiusemajne. Tio signifis kalkulojn, ĉar por pligrandigi la enspezojn S^{ino} Micard vendis bombonojn kaj trinkaĵojn al la ĉeestantoj.

Spite la lacigojn, gesinjoroj Micard estis kontentaj, ĉar ili sciis, ke tio estas utila, ke almenaŭ dum momento en la semajno vilaĝanoj taŭge distriĝas. Ili sciis, ke tiu laboro alportas monon al la kaso de la vilaĝa kulturdomo, kiu bezonis ĝin por sia ampleksiĝo.

Kvankam la instancoj ne helpis, tamen la vilaĝa kulturdomo kreskis. Tien venis unu aŭ du fojojn en la semajno gejunuloj por provludi, konstrui dekorojn, fari scen-kostumojn, diskuti pri la programo de la aktivaj, ĉeesti prelegon, spekti filmon. Kiom fieraj ĉiuj estis, kiam ili aŭdis aŭ legis en gazeto, ke kulturdomo tia, kia ilia, estis malofte trovebla en malgrandaj vilaĝoj (eĉ en pli grandaj)! Ili estis tre dankemaj al gesinjoroj Micard, kiuj plie ĉiujare organizis vojaĝon al iu vizitinda loko de la regiono.

Tiom feliĉaj estis ankaŭ la geinstruistoj pro la rezultoj atingitaj, ke post sia emeritiĝo en 1952 ili daŭrigis sian laboron en tiu medio, kvankam ili tiutempe surŝultrigis al si ankaŭ la mastrumadon de la esperantista kulturdomo. Ili trovis inter tiuj vilaĝanoj atmosferon de ili ŝatatan, kaj ili estis certaj daŭrigi batalon valoran, tiun de kulturigo.

Ankoraŭ pli grava montriĝis post lia morto la laboro farita de Henri Micard, kiam prezentiĝis al la daŭrigantoj problemoj antaŭe solvitaj de la ĉefgvidanto. Ĉiuj ankoraŭ pli klare komprenis, kia homo Micard estis. Dank' al S^{ino} Micard kaj grupeto de antaŭaj kunlaborantoj, la afero daŭris, ĉar neniu en la vilaĝo opiniis ebla la malaperon de tia kreitaĵo. Ili dediĉis sian laboron al la memoro de la malaperinta kreinto.

Lukto favora al la homoj

LA ANTAŬA ĉapitro montris, ke Henri Micard ne rigardis limiga sian profesion kaj helpis la homojn ankaŭ ekster la lernejo en la vilaĝo. Sed ankaŭ ekster la vilaĝo, ekster la departemento li agadis.

La instruisto Micard opiniis sian profesion tre grava, ĉar la estonteco de la mondo, de la homo fontas el la lernejo. La responseco de instruisto estas granda. Infanon oni ne premu per tute pretaj ideoj. Oni donu al li la bazajn konojn kaj la rimedojn juĝi tiel, ke fariĝinte plenkreskulo li ne estu instrumento uzebla de iu aŭ alia grupo socia, politika aŭ religia, sed li elektu mem sian sintenon en la vivo. Nur per kulturo la homo povas atingi liberecon.

Instruado estas tro grava, por esti la afero de iu ajn, ie ajn, iam ajn. Oni devas serĉi la plej bonajn instru-metodojn, adapti ilin al la evoluo de la mondo, al la celo atingenda. Tial la instruistoj devas grupiĝi en profesiaj rondoj kaj defendi la rajtojn de la infanoj pri kulturo. Ili devas ankaŭ peti, se necese postuli, kondiĉojn favorajn al tia instruado.

Micard do tre frue aniĝis al sindikato. Li aniĝis ankaŭ al kulturaj asocioj, ĉar li opiniis, ke kulturo disradiu ekster la muroj de la lernejo al tiuj, kiuj ne havas la eblon plu kulturiĝi. Sed Micard ne povis esti nur ano de grupo. Ĉar li eniris asocion pro precizaj opinioj, li tuj defendis siajn ideojn en tiu asocio. Li neniam estis nur ĉeestanto sed partoprenanto.

Ek de siaj unuaj profesiaj jaroj, Henri Micard aniĝis al la « unueca sindikato ». Li tuj aktivis, ne hezitis publike diri sian opinion eĉ antaŭ kontraŭuloj. En 1924 antaŭ kvincent sindikatoj, el kiuj multaj konsilis al li singardecon, li defendis la « saman salajron por ĉiuj instruistoj » ĉu malnovaj ĉu novaj. Li opiniis tion justa, kaj tial sentime diris tion al ĉiuj.

Poste, ĝis 1954, li estis unu el la departementaj administrantoj de la « nacia sindikato de la geinstruistoj ». Dank' al li ties kunvenoj estis ĉiam vivoplenaj, ĉar li ne konsentis, ke multaj sindikatoj estas nur kotizantoj. Li provis skui la ne sufiĉe agantajn gekolegojn kaj entuziasmigi ilin. Iun tagon nacia responsanto venis al la departementa kunveno. Li deziris saluti S^{ron} Micard sed ne konis lin. Kolego diris al li :

« Vi certe ne eraros. Micard estas tiu, kiu plej laŭte protestas. »

Eĉ kiam li ne plu responsis pri la sindikato, li ĉeestis ĉiujn kunvenojn kaj ĉiam laŭte diris sian penson.

Kreinte la vilaĝan kulturdomon de Epineux-le-Seguin, li interesiĝis ankaŭ pri similaj aktivaĵoj en la departemento kaj li estis administranto en la departementa sekcio de la « federacio de laikaj organizaĵoj ». Lian tiuteman laboron oficiale rekompencis atribuo de medalo okaze de la centjara datreveno de la « franca ligo por instruado » en 1966.

Li ĉiam estis tre atente aŭskultata, kaj oni petis de li konsilojn eĉ el aliaj departementoj. Kiam, jam malsana kaj ne kapabla agi kiel antaŭe, li deziris esti, liaj kolegoj rifuzis. Ĝis sia morto li daŭre estis unu el la gvidantoj de tiu asocio, kaj eĉ de sia lito interesiĝis pri ties aktivaĵoj.

Henri Micard deziris kontribui al la feliĉo de la homoj, ĉefe de tiuj, kiuj malfacile perlaboras sian ĉiutagan vivon, ne ĉiam ricevante ĝustan kompenson pro sia laboro. Li interesiĝis pri ĉiuj formoj de

tiucela batalo kaj ankaŭ pri politiko. Tuj post la disiĝo de la socialista partio en urbo Tours, li aniĝis al la komunista partio. Ĉar tie li ne trovis liberecan etoson al li necesan, li aniĝis al la socialista partio. Ankaŭ sur la politika tereno li estis batalanto. Li organizis kunvenojn, kontraŭdiris politikajn kontraŭulojn okaze de iliaj publikaj kunvenoj. Ankaŭ tiuokaze li denuncis la maljustaĵojn kaj la malverojn.

Li ne partoprenis la politikan batalon nur por defendi ideojn. Laŭ Micard ideo valoras ne nur per si mem, sed eĉ pli valoras, kiam oni ĝin povas konkretigi. Li ĉefe estis agemulo, realiganto, organizanto.

Tial li provis apliki siajn ideojn en sia vilaĝo mem. Li jam multe faris favore al la individuoj. Li deziris fari ion favore ankaŭ al la vilaĝanaro. Tiucele estis necese, ke li fariĝu vilaĝa magistratano. Tion li provis, kaj unufoje sukcesis; nur unufoje, kio ŝajnas stranga, tiom granda estis lia sindonemo. Sed en vilaĝetoj oni ofte malfidas la progresemlulojn, eĉ se oni profitas iliajn farojn.

Kion Henri Micard deziris fari per sia eventuala partopreno en la administrado de la vilaĝo? Ni donu al li la parolon; liaj propraj skriboj montras, kia estis la homo :

« Por tion realigi, necesas granda bonvolo kaj komprenemo. Por ke realiĝu projekto, ne sufiĉas horkvarona preparolo en kunveno. Oni ĝin studu ĝisfunde. Oni ĝin pridiskutu, kun ĉiuj specialistoj. Oni instigu la administraciojn. Unuvorte oni laboru, laboru kune. »

Micard ne provis kaŝi siajn opiniojn, kiuj ne plaĉis al multaj vilaĝanoj. Li eĉ substrekiis ilin :

« Mi estas laikulo, ĉar mi neniam forgesis la vilaĝan publikan lernejon, kiu faris min homo respektanta ĉiujn kredojn kaj opiniojn. Mi estas socialisto, ĉar mi profunde opinias, ke la socialistaj solvoj alportos al la malpaca mondo pacon kaj feliĉon. »

Ankaŭ en tiu agado sindikata kaj politika multe helpis S^{ino} Micard. Gesinjoroj Micard ne lasis la laboron al la aliaj (li eĉ parte konstruis

sian domon!). La kelkaj vesperoj hejme pasigitaj ne estis dediĉitaj al ripozo. Skribomaŝino estis alportita sur la tablon. Micard tajpis stencilojn por cirkuleroj. Poste funkciis hektografo. S^{ino} Micard kolektis la cirkulerojn kaj ilin metis en kovertojn, por ke ili estu senditaj la postan tagon. Eventuale dum ferioj helpis ankaŭ la infanoj.

En 1959 okaze de elektado Micard skribis, en la bulteno sendota al ĉiuj balotontoj :

« Mi estas sesdek-du-jara : multaj zorgoj min superŝutas ; mi do havas neniun ambicion krom la deziro dediĉi miajn lastajn jarojn al servado de miaj samvilaĝanoj. »

Kaj fakte, ekstere de la vilaĝa estraro, li servis. S^{ro} Guillot, reprezentanto de la edukada inspektoro, tute prave diris apud lia tombo :

« Jes, S^{ro} Micard, vi utile laboris ; vian mision vi plensukcese plenumis, kaj sur la homa vojo vi postlasis spurojn, kiujn la postvenantoj certe sekvos. La loĝantoj de tiu vilaĝo, al kiu vi dediĉis viajn fortojn, kaj kiuj hodiaŭ manifestas sian dankemon, via kolegaro, kiu per sia ĉeesto montras sian estimon al vi, la infanoj de Epineux, kiuj ankoraŭ longtempe profitos de via sindonemo, ne forgesos. »

Jes, certe, ankaŭ ili ne forgesos vin, Micard.

Lukto favora al la internacia interkompreniĝo

LA TUTA aktiveco de Henri Micard celis progresigon de la homo al feliĉo. Sur la politika kampo li opiniis, ke ĉiu homo devas ricevi ĝustan parton el la profito donita per sia laboro. Sur la sindikata kampo, la instruistoj ricevu de siaj responsantoj ĉiujn eblojn taŭge praktiki sian tiom gravan profesion, kaj ĉiuj infanoj ricevu de ili similajn okazojn uzadi siajn kapablojn. Sur la instrua kampo, oni preparu la infanojn per metodoj plej taŭge adaptitaj al ĉiuj karakteroj, al ilia rolo en la socio, al ilia homa rolo, kiu baziĝas sur komprenemo, justeco, respekto al ĉiuj sinceraj kredoj.

Tiuj ideoj devenantaj de profunda amo al la homoj kondukis lin al Esperanto, ĉar li tuj sentis, ke per internacia, neŭtrala lingvo la homoj pli facile (ĉar rekte) interkomprenus unu la alian, ne blinde akceptante kion oni diras al ili pri la aliaj. Tial ek de la jaro 1921 li vizitadis parolan kurson gvidatan de S^{ro} Echenbrenner en urbo Sablé-sur-Sarthe dek tri kilometrojn malproksima de Epineux. Li regule iris al Sablé-sur-Sarthe, kaj partoprenis en la vivo de la esperantista grupo de tiu urbo. Nur en 1934 li mem gvidis kurson en tiu urbo. Li vigligis la esperantistan rondon per vojaĝoj al eksteraj landoj kaj per akceptado de eksterlandaj grupoj.

La saman jaron en urbeto Lesconil, en Bretonujo, instruisto S^{ro} Bourguignon organizis « someran lernejon » por la geinstruistoj dezirantaj lerni aŭ praktiki la internacian lingvon. Micard ĉeestis

tiun someran lernejon. La loko elektita por la sekvantaj somera lernejo estis urbo Cap d'Ail sur la suda marbordo. La sukceso de tiu studperiodo estis tiel granda, ke la ĉeestantoj opiniis, ke S^{ro} Bourguignon sola ne povas organizi la sekvantajn.

Estis do decidita la starigo de speciala asocio : Grupo de Esperantistaj Edukistoj (G.E.E.). La prezidanto estis F^{ino} Jeanne Dedieu, kiu ankoraŭ en 1966 okupis tiun postenon. Intertempe ŝi fariĝis prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Ĝenerala sekretario fariĝis Micard.

Unu el la taskoj de la ĝenerala sekretario estis la organizado de la someraj lernejoj. La unuan li organizis en urbeto La Tranche-sur-Mer, en departemento Vendée. Granda estis la laboro, kiu komenc-



Federacia kongreso en Sablé-sur-Sarthe majon 1939.

iĝis jam dum Pasko : vizito de la urbestro, la lernejestro, la hotelestroj.

Multaj instruistaj gesamideanoj venis al La Tranche-sur-Mer. La kursoj estis diligente vizitataj kaj la maro tre bonveniga. Okazis ankaŭ kunvenoj, pri kiuj oni multe diskutis, kelkfoje tre laŭte. La loĝantoj de la marborda urbeto ofte vidis la viglan aron kaj kompreneble la verdan stelon.

El la multaj, diversstemaj diskutoj eliĝis la konvinko, ke ne sufiĉas nur unu somera lernejo, ĉar la partoprenantoj estis multaj, kaj ne estis facila la gastigado de ĉiuj. Cetere, kelkaj preferis la marbordon, kaj aliaj la montaron aŭ la kamparon.

Tial ĝis 1939 okazis ĉiujare du someraj lernejoj. En 1937 denove en La Tranche-sur-Mer kaj en urbo Sallanches en Alpoj; en 1938 en urbo Erquy sur la norda Bretonuja marbordo kaj en urbo Poissy apud Parizo; en 1939 en urbo Pornichet sur la Atlantika marbordo kaj en urbo Gérardmer en Vogezoj. Konsekvence la laboro de la organizanto duobliĝis. Post la fino de la somero, Micard tuj pensis pri la sekvonta, li kontaktis urbestrojn, lernejestrojn kaj hotelestrojn en diversaj urboj, li sciigis la rezultojn al la konsilio de G.E.E., li propagandis la studperiodojn, li sendis informojn al la interesatoj, ktp.

En 1939 pro la dua mondmilito la tiujaraj someraj lernejoj fiaskis. La esperantistaj aktivaĵoj en multaj landoj ĉesis aŭ estis ĉesigitaj. En Francujo mem esperantistoj estis arestitaj, deportitaj. Multaj mortis aŭ estis mortigitaj.

Ek de la liberigo de la lando en 1945, G.E.E. revivis. Micard komisiite de la estraro tuj organizis la unuan postmilitan someran lernejon en Sablé-sur-Sarthe.

Tamen pli kaj pli malfacila estis la organizado de tiaj renkontoj pro diversaj kialoj : la marbordoj estis parte malpermesataj, ĉar danĝeron prezentis bomboj ankoraŭ kuŝantaj en la sablo, en la

arbaroj aŭ en la blokhaŭsoj; cetere multaj el la marbordaj vilaĝoj aŭ urbetoj estis parte detruitaj; la lernejoj en kamparo kaj montaro estis ofte uzataj dum la somero por akcepti infanojn el la urboj; la prezoj en la hoteloj estis tro altaj por instruista salajro.

En 1946 okazis la somera lernejo en urbo Sassenage ĉe Alpoj; en 1947 denove en Sablé-sur-Sarthe kaj en urbo Belmont; en 1948 en urbo La Rochelle; en 1949 en urboj Angoulême kaj Granville; en 1950 en urbo Saint-Germain apud Parizo. Sed en la printempo 1951 Micard trovis neniun urbon por akcepti la venontan someran lernejon.

La malfacilaĵo estis eltrovo de ĉiujare nova loko. Kial la someraj lernejoj ne havu definitivan lokon? Ĝuste en Sablé-sur-Sarthe estis vendebla granda domo. Tiu estus la solvo. Sed kiel ni ĝin aĉetus? Micard tuj sin turnis al geamikoj, kaj la multobligilo ekfunkciis. La tiamaj G.E.E.-estroj, F^{ino} J. Dedieu, S^{roj} Debande, Thébaut, Bidoit kaj Boyet, aprobis la unuan cirkuleron, senditan al cent esperantistoj, en kiu Micard skribis:

« La organizado de somera lernejo estas pli kaj pli malfacila, ĉar ni ne disponas pri domo *posedata de ni...* Tiu hodiaŭa revo povas fariĝi morgaŭa realo. Por tio sufiĉas, ke kune ni volu... Nuntempe estas vendebla en Sablé bieno kun domo, kiu povas gastigi proksimume kvindek personojn... Ni povus trovi lokon pli favoran ol Sablé. Sed estas necese, ke proksime loĝu esperantisto, kiu konsente laboros kaj kreos kion ni deziras. Mi esperas, ke mi fariĝos pensiulo post unu jaro. Eble mi travivos la necesajn jarojn por starigi kaj firmigi tiun aferon...

« Sufiĉus, ke sescent esperantistoj pruntedonu po dek mil frankoj, por ke ni disponu pri la ses milionoj necesaj. (Sekvis plano de organizado de asocio.) Ĉu tia afero povos vivi kaj prosperi? Mi opinias jese. »



Micard
en
Grésillon.

En tiu unua cirkulero oni trovas entute la homon Micard. Li opiniis agadon necesa. Li tuj decidis, ke li provu. Li ne proponis «nubojn», sed metis klaran proponon. Li eĉ trovis la deĵorantojn, sin mem kaj kompreneble S^{inon} Micard; li kuntrenis volontulojn, nur ĉar li mem donis ekzemplon. Li estis preta sin dediĉi al la propono.

La respondoj estis multaj kaj kuraĝigaj. La tiujara somera lernejo povis okazi dum nur dek unu tagoj en urbo Houlgate dank' al la helpo de ne-esperantista amiko de Micard. Realigo de la revo estis urĝa.

La 16^{an} de septembro kun nur iom pli ol unu miliono en la proviza kaso, asocio estis leĝe starigita en Parizo. Ĝi ricevis la nomon «Kulturdomo de franclandaj esperantistoj». La estraro konsistis ĉefe el G.E.E.-anoj, kaj Micard estis la prezidanto. La celo de tiu asocio estis aĉetado de domo, bieno kaj materialo disponigenda al la esperantistoj por iliaj renkontoj, distriĝo kaj kulturigo.

La unua paŝo estis farita. La estonteco ŝajnis sennuba. Sed... intertempe vendiĝis la domo en Sablé-sur-Sarthe. Alia vendebla domo ekzistis apude, en urbeto Brûlon. Sed ankaŭ tiu espero vantiĝis. Nova cirkulero estis sendita al la konsilianoj de la asocio. Ĉu Micard malkuraĝiĝis? Tion opinius, kiu ne konis lin.

«Mi ne kutimas longe insisti pri la pasinteco, kaj laŭ mia penso Brûlon estas jam pasinteco... Mi devas viziti la 18^{an} de oktobro du kasteletojn, la unuan je du kilometroj de urbo Baugé, la alian en Baugé mem.»

La 19^{an} de oktobro per nova cirkulero Micard sciigis, ke li vizitis la kastelon Grésillon:

«Regiono agrabla, bone situanta; kastelo belaspekta sed sen elektra lumo nek akvo en la ĉambroj; ĉio estas ebla por la estonteco; sufiĉus, ke oni trovu ankoraŭ unu milionon.»

Oni bedaŭrinde ne trovis ĝin. Tiu manko de mono estis grava malhelpo, pro kiu Micard faris multajn vojaĝojn al Baugé, dum li serĉis pli favorajn kondiĉojn. Estis necese disigi la bienon en du partojn, ĉar la tuto estis tro multekosta. Fine interkonsento atribuis al la kulturdomo ok hektarojn kun la konstruaĵoj kontraŭ tri milionoj. La 4^{an} de novembro estis oficiale subskribita la interkonsento. Tuj estis pagitaj unu miliono kvincent mil frankoj. La cetera sumo estis pagenda en tri partoj ĝis la 1^a de decembro. Tamen la asocio ne posedis la tutan sumon!

Ve! la posedantino sciigis, ke ŝi deziras ricevi la sumon tuj. Ne eblis! Micard ne rezignis la aferon. Li trovis lignovendiston, kiu konsentis pri aĉeto de la tuta bieno kaj revendo de parto al la asocio. La batalo pri la arboj atribuendaj al la arbovendisto aŭ al la kulturdomo fariĝis ankoraŭ pli akra.

Fine ambaŭ «batalantoj» akordiĝis: la arbovendisto vendis la konstruaĵojn kaj ok hektarojn kontraŭ tri milionoj da frankoj. Tuja pago de du milionoj estis ebla, sed pago de la cetera miliono antaŭ la fino de decembro estis pli malfacila. Restis nebula la rimedo pagi la impostojn kaj makleran procentaĵon (750 000 F) je la fino de januaro! Nova alvoko estis farita. Kaj dank' al «skrapado de fundo de tirkestoj» kastelo Grésillon fariĝis posedaĵo de la Kulturdomo de franclandaj esperantistoj.

Grandan batalon gajnis Micard. Li ĝojis, ĉar «de nun la esperantistaro havos sian domon.» Li multe klopodis por atingi tiun celon sciante, ke de tiam komenciĝos nova etapo, kiu estos fonto de novaj zorgoj. Dank' al li, la asocio estis posedanto de belega konstruaĵo... tiel malplena kiel la kaso. Neniam troviĝis la sescent esperantistoj, kiuj per sia helpo povus ebligi la necesajn aranĝojn: instaladon de akvo kaj elektro, aĉetadon de litoj, littukoj, kovriloj, tabloj, manĝilaro, kuirilaro, ktp.



Gesinjoroj
Micard
provas
trovi
liberan
ĉambron
por ĵus-
alveninto.

Per instigo de Micard, kelkaj volontuloj venigis la elektron en la ĉambrojn dum Pasko. Kelkajn semajnojn poste, estis eble sammaniere venigi la akvon kaj fiksi la lavabojn.

« Ĉu malfermo de la kastelo dum ĉi somero estos ebla ? »

Tiun demandon multfoje metis al si gesinjoroj Micard. La alvokojn pri financa helpo sekvis alvokoj pri prunto de materialo. En aŭgusto 1952 la unuaj vizitantoj alportis siajn littukojn, kuŝis en litoj pruntedonitaj de la direktoro de proksima lernejo, uzis la meblaron kaj manĝilaron de gesinjoroj Micard! Cent kvindek personoj vizitis la kastelon, kaj Micard skribis :

« Mi povas aserti nun, ke la funkciado konfirmis la plej optimistajn esperojn; la enspezoj ebligis pagon de la ordinaraj elspezoj dum la tuta jaro. »

Li forgesis diri, ke tiun rezulton oni atingis ne nur per la ĉeesto de cent kvindek gesamideanoj, sed ankaŭ dank' al lia granda sindonemo kaj la sindonemo de S^{ino} Micard, akceptantino, kuiristino kaj servistino!

Dank' al loterio, la kulturdomo aĉetis en 1953 sian propran meblaron. Tamen mankis komforto. Multaj personoj, kiuj ne komprenis, kia grandiozaĵo jam estis la malkomforta kastelo, akre plendis... kaj neniam revenis.

La vivo de gesinjoroj Micard estis de tiu jaro 1952 grandparte dediĉita al la pluvivado, al la komfortigo de Grésillon. La laboro farenda estis grandega. Ĝi bezonis ne nur sindediĉon, sed ankaŭ entuziasmon nedifekteblan pro riproĉoj aŭ malhelpoj, kaj ankaŭ diplomatecon en la neeviteblaj diskutoj, eĉ kvereloj. Estis necese, ke la vojo sekvenda estu klare difinita kaj senmanke irata. Estis necese malplezurigi tiujn, kiuj ne vidis la larĝan fosaĵon inter la farindaĵoj kaj la fareblaĵoj.

Nur entuziasma homo povis sin ĵeti en tian batalon, nur kuraĝa homo povis daŭre labori kontraŭ ĉiuj ventoj, laŭ celita direkto. Nur

diplomateca klarvida homo povis gvidi tian aferon ĝis pli kvietaj akvoj. Tia estis Micard. Plie, li tiel bone konis la homojn, ke li neniam postulis de ili pli ol ili povis fari, sed eltiris el ili pli ol ili mem sin kredis kapablaj fari.

Ni esperu, ke ĉiuj esperantistoj konscias pri la granda paŝo farita de la esperantista movado dank' al Henri Micard.

La unua eldono de tiu omaĝo al Henri Micard aperis en *Kulturaj Kajeroj*, 1966, n° 6.

Ĉi dua revizita eldono aperis en decembro 2009.

Partoprenis korektadon Jeanik Marolleau kaj Christian Rivière.

Presis Dominik Bertrand, Kulturdomo de Esperanto, Grésillon, 49150 Baugé, Francujo.